

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA „DRUŠTVO HRVATSKIH ESPERANTISTA“
KAJ DE LA „KROATA AKADEMIA ESPERANTISTA SOCIETO“.

MONATA

GAZETO.



La „Kroata Esperantisto“
aperas la 20^{an} de ĉiu monato.

Abono:

1 jaro (12 numeroj) K 4.—
(6 numeroj) K 2.—
Por eksterlando jare K 4'60
Por unuiganoj jara abono K 2.—

Redakcio kaj Administracio:
Zagreb, (Kroatujo) Zrinjski trg 16.

Redaktorino: **Danica de Bedeković.**

Reklamo:

1 paĝo K 25 1/4 paĝo K 7
1/2 „ „ 13 1/8 „ „ 4
kun unufoja apero.
Por 7—12 anoncoj 25% rabato.
Po linioj laŭ interkonsento.

ENHAVO: VI. esp. kongres u Washingtonu. — Braĉa Bugari u Zagrebu. — Aŭstria internacia Esperanto-tago — Ježić: Se ci sciis... — O. van Schoor: Mia unua doloro. — Greinz-Rosenstock: La diamantoj. — Ignotus-Rajczi: La tago de la gloro. — Jovanović-Avdalović: Nokto apud la landlimo. — Zvezdić: Saĝa respondo. — Humoraĵoj — Druŝtvane vijesti. — Različite vijesti. — Bibliografio.

VI. SVJETSKI INTERNACIONALNI KONGRES ESPERANTISTA U WASHINGTONU.

Naŝim je cijenjenim ĉitateljima veĉ znano, da ĉe se ove godine veliki esperantistiĉki kongres obdrĉavati od 14. do 20. kolovoza u Washingtonu, koji je jedan od najljepŝih gradova svijeta. Washington broji blizu 300.000 stanovnika, pak je glasovit sa svoje ĉistoĉe, sa svojih ŝirokih ulica i drvoreda, mnogoga drveĉa, lijepih perivoja, veliĉanstvenih zgrada od mramora i granita. Od mnogih znamenitosti pominjemo »Bijelu kuĉu«, stan predsjednika Sjedinjenih drĉava, »kapitol«, gdje se sastaju kongresi sjed. ameriĉkih drĉava; kongresnu biblioteku, koja je najljepŝa i najveĉa na svijetu; 171 m visoki spomenik Washingtonov, najviŝa gradnja ovoga svijeta, koji imade iznutra brzi elevator, koji nosi ljude do visine od 155 m, »Narodni trezor« sa svojim ogromnim blagajnama; prekrasne zgrade vladinih departementa; »Corcoran« galeriju umjetnosti; »Smithsonian«, narodni i lijeĉniĉki muzej, botaniĉke vrtove, zooloŝki park i t. d. — svuda je ulaz besplatan.

Mjesec kolovoz zovu u Washingtonu »Mjesec putnika«, jer tada ima tamo obiĉno viŝe posjetioca nego u ikojoj drugoj dobi godine. Vrijeme je u kolovozu mjereno toplo, veĉeri ohladne, osvjeĉujuĉe.

Za vrijeme esp. kongresa priredit ĉe Washingtonci svojim posjetiocima mnogo zabava na pr. ekskurzije kod mjeseĉine na velike vodopade rijeke Potomac, na Glen Echo, na Chevy Chase jezero i t. d. i voĉnje na kamecima po lijepoj rijeci Potomac uz glazbu; plesove, bankete i drugo.

Ekskurzije upriĉit ĉe se na Mount Vernon, vlastitu kuĉu i grob Georga Washingtona, gdje se moĉe vidjeti namjeŝtaj i t. d. ŝto ga je upotrebljavao za svoga života, saĉuvan tako izvrsno, te izgleda joŝ sasvim onako, kao prije 150 godina; zatim na Arlington Cemetery, na Chesapeake Beach (izg.: ĉesapik beĉ), Cabin John Bridge (izg.: kabin dĉon bridĉ), najdulji kameni svod na svijetu; Alexandria, narodni dom za stare vojnike, luku za vojne brodove i t. d. Sat daljeno od Washingtona moĉeŝ imati izvrsnu kupelj u slanoj vodi.

Toĉnige obavijesti o kongresu saznat ĉemo iz slijedeće prve okružnice, nam ju je priposlao kongresni odbor:

La sesa internacia kongreso de Esperanto Washington, U. S. A.
14a—20a Aŭgusto, 1910. Unua Cirkulero. La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Washington, D. C. (Distrikto de Kolumbio), la kapito de Usono, de la 14a ĝis la 20a de Aŭgusto, 1910a

Tia anonco mem devus sufiĉe certigi al vi, ke la Sesa superos ĉiun antaŭan kongreson, ĉar la amerikanoj estas famaj pro sia maniero fari aferojn, kaj oni povas konfidi je la Usonanoj por fari la venontan kongreson la plej sukcesplena el ĉiuj.

Oni klopodas por aranĝi grandan laŭdindan kongreson, kaj la Organiza Komitato, kiu kontrolas ĉiun detalon de la laborado, konsistas el zorge elektitaj gesinjoroj, kiuj estas bonekonataj pro siaj specialaj kapabloj, kaj ankaŭ pro sia entuziasmo pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Inter la komitatanoj troviĝas la jenaj: John Barrett, Direktoro de la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, kaj Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko. Edwin C. Reed, Ĝenerala Sekretario-Kasisto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, Sekretario-Adjunkto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, Sekretario de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso. Kolonelo Robert N. Harper, Prezidanto de la »District National Bank«, membro de la Washington'a Ĉambro de Komerco, Kasisto de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso. Pr-o W. J. Spillman, el la Usona Departemento Agrikultura, Prezidanto de la Aga Komitato de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, Prezidanto de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso. William F. Gude, Prezidanto de la Washington'a Ĉambro de Komerco, prezidanto de la Esperantista Federacio de la Distrikto de Kolumbio. D-ro Ivy Kellerman-Reed, Prezidanto de la Komitato pri la Kongresa Konkurso Literatura. I. C. I. Evans, Sekretario-Kasisto de la Esperantista Federacio de la Distrikto de Kolumbio, Helpa Sekretario de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso. Kaj la Prezidantoj de la specialaj Komitatoj pri anoncado, gvidlibroj, kunvenejoj, memorajoj, kunvenoj sekciaj, ekskursoj, amuzado, loĝado, eksperimentoj de la ruĝa kruco, basbalo, transportado, Diservoj, ktp.

Kongreskartoj. La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedantojn en la diversajn kunsidojn, amuzojn, k. t. p., oni povas nun aĉeti po kvin dolaroj (dek spesmiloj). Al ĉiu ĉeestanto ĉe la kongreso, kiu venos el iu alia parto de la mondo ol Norda Ameriko, la kasisto repagos la sumon de du dolaroj kaj duono (kvin spesmiloj). Al ĉiu kongresano el Norda Ameriko estos rabato de unu dolaro (du spesmiloj) kondiĉe ke la karto estas aĉetita antaŭ la unua de junio. Oni devas mendi sian kongreskarton de la Sekretario (ĉe la adreso sube) aŭ de la Centra Oficejo Esperantista, 51 rue de Clichy, Paris.

(Daŭrigota).

BRAĈA BUGARI U ZAGREBU.

Primamo od našega vrloga prijatelja i suradnika iz Bugarske, profesora Esperanta g Iv. H. Krestanofa slijedeću obavijest:

Grava avizo al kroataj esperantistoj. Jam delonge la Plevena gimnazio preparas fremdlandan ekskurson, kiu fine estis priparolita kaj permesita de la ministrejo de l'popola instruado.

La deziro ĉe multaj gimnaziaj profesoroj kaj gimnazianoj de l' Plevena gimnazio — deziro vojaĝi fremdlanden — estos baldaŭ plenumota, kaj por la esperantistoj propagandemaj feliĉa okazo estos prezentota montri, ke ni vivas kaj uzas nian lingvon!

La ekskurso okazos de la 10. ĝis la 24. Aprilo 1910. malnova stilo, kaj ĝin prenos pli ol 20 personoj; inter kiuj kelkaj profesoroj. —

La plimulto de la ekskursontoj estas esperantistoj kaj membroj de U. E. A., nun rajtas uzi la servojn promesatajn de U. E. A. Ĉiuj estas ekinteresitaj pri Esperanto kaj kelkaj vojaĝos nur per ĝi!

Tial, karaj gesamideanoj kaj kunbatalantoj kroataj estu maldormaj dum la de la ekskursontoj en via lando kaj ne perdu la okazon, la feliĉan kaj ne okazon, propagandi ĉiumaniere kaj montri ke Esperanto vere, ĉiam kaj ĉervas!!

La ekskurso estas la jena: Eliro el Pleven la 10an de Aprilo kaj forveoer la vagonaro ĝis la stacio Somovit sur Danubio. De tie senhalte ĝis Budapeŝto oni vojaĝos per vaporŝipo. En Budapeŝto oni haltos 2 tagojn, post kio tra la Danubo kaj Fiume oni mare vojaĝos kaj haltos Venecion. De tie tra Bologna kaj Florencion (Firenze) — la celo de la Ekskurso — kie ili restos dum 2 tagoj por trarigardi ĉiujn vidindaĵojn, tombojn de famuloj, konstruaĵojn ktp., en Firenze tra Ankona oni mare revenos Fiume'on kie haltos nur 1 tago, post kio ĉiuj grandplezure forvojaĝos la slavan-kroatan ĉefurbon Zagreb (bonekonata en Bulgarujo), kie ili restos 2 tagojn kaj kie versajne ili estos tre bone atenditaj kaj gastigitaj de niaj fratoj-slavo, la kroatoj!

El Zagrebo tra Indio en Belgradon — la serba ĉefurbo kie haltante nur 1 tago ili feliĉigitaj kaj gojigitaj plenaj de bonaj memoroj kaj aventuroj (tio ĝis Zagreb dependas de la esperantistoj tra kies lokoj ili pasos) revenos Pleven'on. Karaj gesamideanoj, ne perdu la feliĉan okazon. Ni montru nian forton! Via restano (Del. U. E. A. — Pleven, Bulgarie).

Hrvatski esperantisti raduju se, ŝto ĉe imati zĝodu pozdraviti u svome glavgradu svoje istomiŝljenike bratskoga im naroda bugarskoga. »Druŝtvo hrv. esperantista« i »Klub Akademiĉara Esperantista« odlučili su, prirediti u počast gostovima koncert s plesom, o ĉemu ĉe se javiti pravodobno u našim novinama.

AUSTRIA-INTERNACIA ESPERANTO-TAGO, WIEN.

Kako smo izvijestili veĉ u proŝlome broju, biti ĉe na Duhove 14. i 15. de aprilo g. u Beĉu meĉunarodni austrijski Esperanto-dan, na koji nas odbor toga dana najusrdnije pozivlje. — Zaĉ. ĉlanovima ovoga odbora izabrani su iz Zagreba: g. Mirko Bothe, veleposjednik, gđa D. pl. Bedekoviĉ, g. P. Jakovljeviĉ knjiŝar i novinar i g. satnik Mirko Kelek.

Svrha je toga dana, pokazati svijetu, kako se u Esperantu i razliĉite nacioj (kojih ima — kako znamo u Austro-ug. monarkiji dosta) slaŝu i razumiju. Princip ovoga pothvata jest neutralnost. Afere političke, religiozne i t. d. ne spadaju onamo.

Odbor nam ŝalje opseŝni program sveĉanosti, (kojega si moŝe svaki, koji se interesas, dazvati, ljubeznome pozivu beĉkih Esperantista, u našem uredniŝtvu pogledati i zavrŝuje ovako: Vrlo cijenjeni istomiŝljenici! Pozivljemo Vas da dodete na Esperanto-tago u Beĉ, da sudjelujete u našem radu, u našim prvim koracima za slogu Esperanto-tago u Beĉu, da budu dobar temelj daljnjega zajedniĉkoga rada, na da uĉvrsti naš pokret i da nam daĉe nove jakosti

Odazovite se našem pozivu i pokaŝite kako meĉu esperantistima ĉitave vladave ĉije vlada jedinstvenost, vjernost, nepristranost kao rezultat ideje, koju mi promoviramo po esperantizmu! Esperantski pozdrav! Vivu Zamenhof! Beĉ, 21. oŝujka 1910.

— La esperanto-tago komitato.

Literatura kaj amuziga parto de »Kroata Esperantisto«

SE CI SCIUS

De Slavko Ježić.

Se ci scius, kiel granda
Mordas min doloro,
De ĉagreno kiel mia
Pleniĝis la koro! --

Ho pri amo mi revadis,
Pri feliĉo nia
Ĉiu penso mia, ĝemo,
Estis amo cia.

Sed, ve, ĉio nur sur nuboj
Estis konstruita,
Kaj de iom da suneroj
Malsupren ĵetita.

De feliĉo, am lasita
Suferas la koro . . .
Se ci scius, kiel granda
Mordas min doloro!

MIA UNUA DOLORO.*)

Un jour de fête, un jour de deuil,
La vie est faite en un clin d'oeil.

Mi estis dekdujara knabo La vivo montris al mi nur siajn plej belajn flankojn kaj senzorge kaj senpripense mi ĝuis plenege la plezurojn, kiujn dekdujara naiva knabo povas ĝui.

Krom la lerneja tempo, ĉio estis ludo kun la amikoj. Vintre, mi ĝojege rigardis la blankajn neĝerojn, turniĝante falantajn, kiuj poste estis por mi konstruaĵo materio por neĝaj homoj kaj kasteloj kaj per kio mi faris bulojn utilajn en niaj — ne ĉiam pacaj — bataladoj. La frostita ebenaĵo de la akvo estis mia glitkampoj kaj vespere apud la fajro sidante, mi plezurege aŭskultis la feinajn rakontojn de mia kara patro. Somere la longaj tagoj, la belaj kamparoj estis ĉiamaj okazoj de romenadoj kaj mi ĉiuvespere hejmen revenis, kiam la lastaj radioj de la kuŝiganta uno jam malaperis en la okcidenta horizonto. Printempo donis al mi siajn florojn kaj aŭtuno siajn fruktojn kaj la vivo estis por mi neĉesanta ĝuado kaj ĝojego.

Belaj tagoj, kiel longtempe jam, ho ve! forflugintaj.

Antaŭ la pordo de mia hejmo fluis la rivero Skeldo, kie mi ĉiutage rigardis la ŝipojn kun blankaj aŭ brunaj veloj, veturantaj sur la ĉiame movanta akvo. Bela rivero, arterio, veturiganta la komercan sangon de nia lando kaj ĉie, kie ĝi trafluas, sufiĉegon de la kampoj, riĉecon de la komerco kaj bonŝtaton por ĉiuj disdonanta!

Nia urbo ne estis marhaveno sed tamen ĉiujare ĝi ricevis la viziton de du aŭ tri marŝipoj, malgrandaj golet-brik- aŭ barkŝipoj, ŝarĝitaj per ligno, gudro aŭ sekitaĵoj fiŝoj.

En la komenco de Aŭgusto 1885., alvenis en nian havenon beleta germana brikŝipo »Hellas«, ŝarĝita per ligno el Norvegujo. — Kiam estis marŝipo en nia haveno la knabaro de nia urbo havis festtagojn, ĝis kiam la ŝipo forlasis la havenon por daŭrigi sian marvojaĝon al alia malproksima lando. De la fruaj matenhoroj, ĝis kiam la vespera mallumo ekkovris la teron, la knabaro ludis apud la riverbordo kaj sur la ferdeko de la ŝipo, kaj nia plej granda plezuro estis ricevi de la ŝipa kuiristo unu aŭ duonan marbiskviton. Tiuj marbiskvitoj estas tre maldolĉaj, stranggustaj kukoj, nur manĝeblaj de personoj kun bonegaj dentoj, sed ĉar tiuj kukoj estas io eksterorda, ni ĝuis nedifineblan plezuron ricevante kaj manĝante ilin, kaj tre ofte mia kora patrino al mi diris, montrante la marbiskviton:

*) Osobito se radujemo, ŝto je pisac ove crtice (iz vlastitoga svoga života) postao našim radnikom. G. prof. Oscar van Schoor, iz Antverpena jedan je od najvršnjih, najpoznatijih esperantista koji je također nagrađen kod »Floraj ludoj« u Barceloni.

Pro manko da spaco la daŭrigo de »La morto de Small-aga Ĉengijé aperos« la venonta numero.

»Se mi estus doninta tian manĝaĵon al vi, certe vi preferus fasti dum unu semajno«.

Malgraŭ tiuj ripetitaj patrinaj rimarkoj, mi ĉiutage, same kiel la aliaj kunlaborantoj petis al kuiristo: »Kuiristo, marbiskvito?»

La estro de la briksipo »Hellas«, Gustavo Höpfer el Ŝtetino, estis dika, trogranda viro, kun brunaj haroj, bela barbo kaj belaj okuloj. Ĉar mi sciis baldaŭ kelkajn vortojn angle, mi povis veni ĉiutage ĉe lin sur la ŝipon kaj li donacis al mi fremdlandajn poŝtsignojn kaj germanajn kukojn; li permesis al mi ludi en ĉiuj partoj de la ŝipo; eĉ mi suprenrampis kelkfoje per la ŝnurega ŝtupetaro ĝis la kaptokaprajto de la granda masto.

Dum la ok tagoj, kiujn la ŝipo pasigis en nia haveno, la ŝipestro kaj mi fariĝis bonegaj amikoj. Do, mia amiko Höpfer, akceptinte novan vojaĝon por reveni al nian urbon post ses aŭ sep monatoj, promesis al mi alporti tiam skandinavajn kuriozaĵojn kaj poŝtsignojn kaj la 15an de Aŭgusto, je la dua posttagmezo, li devis revenveturi kun sia ŝipo.

Antaŭ ol forlasi nin, li venis en nian hejmon kaj post trinko de glaso da vino, li estis la nomfesttago de mia kara patrino, li diris al ni ĉiuj:

»Karaj amikoj, ĝis la revido, post ses monatoj«.

Mi mem malligis la lastan ŝnuregon, kiu tenis lian ŝipon al la riverbordo kaj kun mia blanka naztuko, plorante, mi salutis lin, ĝis kiam la ŝipo el mia vido estis malaperinta.

Ĉiutage, post tiu disiĝo, mi pensis pri mia amiko ŝipestro kaj kiam unu monato forpasis, mi skribis al li — en malbona angla lingvo — longan leteron, kun mi sendis al ekspedista firmo entrepreninta la ŝarĝadon de la ŝipo.

Malpacience mi atendis respondon de mia amiko. Vane; nenia respondo venis. Sed, post ses semajnoj, iumatene, la poŝtisto alportis ĉe miajn gepatrojn mandan leterkoverton, senditan de la Centra Postoficejo kaj sur kiu estis skribita: »Letero resendata al sia sendinto«

Malferminte ĝin, mi trovis en ĝi la leteron, kiun mi ses temajnojn antaŭe sendis al mia amiko. Sur la malantaŭa parto de la koverto enhavanta mian leteron, mi legis nur tiujn kvar vortojn:

»Ŝipo perdita, ŝipestro pereinta«

Dudek kvin jaroj forflugis jam de tiu momento kaj ĉiam la memoro pri tiu malfeliĉa tago restas gravurita en mia koro. Kaj ne mirinde: la malfeliĉa ŝipestro estis la unua amiko, kies morton mi ploris; la mallongaj sed malĝojigaj vortoj: »Ŝipo perdita, ŝipestro pereinta« estis la unua elreviĝo de miaj junecaj jaroj; ili ŝuldis mian unuan doloron. Post tiu tago la vivo ne produktis nur rozojn por mi, sed multnombrajn dornojn: elreviĝojn, malĝojojn kaj dolorojn.

Tamen, tre ofte, ankoraŭ nun, kun sento de intima malĝojo, mi rememoras mian malfeliĉan amikon Höpfer, la ŝipestron de la »Hellas«, kies mortnovaĵo estis la kaŭzo de mia nua doloro.

Amsterperen 19. 5. 1909.

Oscar van Schoor originale verkis.

LA DIAMANTOJ.

(aŭrigo).

izo.

dolf Greinz. Tradukis Stanislav Rosenstock.

Ili ebrügadis sin ambaŭ eĉ en siaj maljunecaj jaroj per la revata posedo de la diamantoj. En la lastaj jaroj ili konsentis je ia paro de ŝtonoj, kiu brilegis la elmontra fenestro de juvelbutiko de ilia hejma urbo.

Poste ili kalkuladis, kiom ĝi pli malpli devus kosti. Rezultis ĉiam sumo, kiu ne terurigis. Sed eble tamen iam . . . eble tamen iam . . . se ankoraŭ fine ne atendite venus dum nokto la feliĉo . . . la suna feliĉo . . . de supra ĉielo . . .

Jes, de supra ĉielo venis la feliĉo dum nokto por la malriĉa, maljuna Doroteo. Sed ne en la briletanta, blanka vesto, kiel ŝi ĉiam revis . . . ĝojeganta . . . kun amaltea korno de l' teraj riĉaĵoj.

Ĝi venis trankvile kaj serioze kun potencaj nigrajflugiloj, kiel la anĝelo de l' morto, kiu fermis ŝiajn lacajn okulojn al eterna dormo kaj paco.

Mallongedaŭra malsano senkompate kaptis la maljunan virinon. En la febra sonĝo, kiu devis esti ŝia lasta sonĝo sur tero, ŝi parolis ofte pri siaj diamantoj. Kaj feliĉege ridetante ŝi ekdormis je eterne, kvazaŭ ŝi ankoraŭ akiris la juvelojn, je kiuj ŝi tiel longe sopiris.

Kun tiu rideto ŝi kuŝis sur katafalko en sia simpla ligna ĉerko meze de malgranda ĉambro. Ĉe ambaŭ flankoj de l' ĉerko brulis po kvar vaksaj kandeloj kaj malgranda oleolampo proksime de la aspergujo ĉe la piedoj de l' mortintino.

Fariĝis vespero. La maljuna violonisto estis sola kun sia edzino, kiu lin nun ankaŭ forlasis.

Sola . . . tute sola li estis sur la vasta mondo. Neniu koro plu, kiu pro li batis . . . Neniu buŝo, kiu haviŝ por li bonintencan vorton de konsolo. Sola plue ĝis la propra celo

La maljuna viro kuŝis sur la ŝanceliĝa sofo, apoginte la kapon sur ambaŭ manoj. Grandaj larmoj fluis malrapide tra la fingroj.

Li meditis, kiel senĝoja estis la vivo de lia Doroteo. Subite li rememoris pri tio, ke ŝi en sia lasta horo parolis pri la diamantoj

La maljuna violonisto rektiĝis ŝajnis, ke li prenis ian decidon. Kliniĝinte li serĉis palpe la keston, starantan en angulo de l' ĉambro.

Li malfermis la kovrilon kaj eltiris siajn tri violonojn. Poste li ĵetis rigardon sur la mortintinon kaj diris per duonlaŭta voĉo: »Vi devas havi la diamantojn, Doroteo. Vi devas havi la diamantojn.«

Kvazaŭ li ion estus malfruinta, li rapidis, kiel li nur povis, el la ĉambro kaj malsupreniris le kvaretaĝan ŝtuparon.

Li sciis pri la komercisto, de kiu li lasis jam unufoje taksi la tri violonojn. Li iris al li kun siaj instrumentoj. La negoco estis baldaŭ farita.

Timeme kaŝis la maljuna viro en la poŝo la paketon de bankbiletoj, la vendoprezon por sia lasta havaĵo. Li neniam kredus, ke li tiel facile povos disigi de sia trezoro.

Li faris tion facile, rimarkinde facile. Tio estis por li simple kiel savo, ke li ŝanĝis la violonojn je kontanta mono.

Kiam li pensis nun pri la malriĉulejo, tio ne estis plu por li maldolĉa sento. Li volonte irus en la malriĉulejon. Se nur Doroteo ricevis siajn diamantojn.

Lia sola zorgo, kiam li forlasis la butikon de l' instrumentvendisto, estis, ke la vendosumo eble ne sufiĉos por aĉeti la ambaŭ ŝtonojn, kiujn ili ĉe la juvelisto admiris.

La mono sufiĉis tamen. La oraĵisto faris kompreneble mirigitajn okulojn pro sia kliento en la malriĉa vesto, kiu permesis al si la lukson de simila aĉeto.

Konvulsie premis la maljuna viro la ujon kun la multvaloraj orelingoj en sia dekstra mano kaj rapidis hejmen.

Fariĝis nokto. Densaj neĝaj flokoj faladis malsupren el la ĉielo kaj brilis ĉe la lumo de elektraĵ lampoj, kiel la diamantoj de Doroteo.

Nune ŝi posedis la diamantojn. Tuj, tuj li volis ornami ŝin per la multekostaĵ ŝtonoj. Se li nur estus jam en la domo!

Pené li suriris la kvaretaĝan krutan ŝtuparon. La mortintino kuŝis en la brilo de l' kandeloj.

Ŝia feliĉa rideto ŝajnis ankoraŭ pli klarigita, ŝajnis saluti lin, kvazaŭ la mortintino scius, kion li hejmen alportis.

La maljuna viro alpaŝis al la ĉerko, deprenis singarde de la oreloj de l' mortintino la arĝentajn ringetojn kaj anstataŭis ilin per la briletantaj diamantoj.

La lumo de l' kandeloj rompiĝis en la ŝtonoj kaj ĵetis brilegantajn refleksojn en la ĉambro.

La maljuna viro starigis ĉe la piedoj de l' ĉerko kaj, subpremante la ĝemon, diris: »Doroteo . . . la diamantoj . . . la diamantoj . . . la diamantoj . . . Mi alportis al vi ankoraŭ . . . la diamantojn . . .«

Poste li prenis la verdan buksan branĉeton el la aspergujo kaj ŝprucigis la tigitan akvon en formo de kruco sur la mortintinon. Kelkaj gutoj falis sur la vizaĝon, vakspalan vizaĝon de l' maljuna Doroteo. Ili brilis ĉe la diamantoj, kiel brilaj ojoj de l' kortuŝo kaj ĝojo sur la senmova vizaĝo.

Plue ludis la kandelflamoj sur la ŝtonoj. Ilia brilo ŝajnis heligi la tutan ĉambro, kiu tiun ĉi brilon envere neniam vidis.

Ekstere neĝis dense kaj pli dense, kaj la neĝo etendis siajn blankajn kovrilojn super la kampoj kaj la urbo kun ĝiaj tegmentoj kaj frontonoj.

Interne en la ĉambro sidigis la maljuna violonisto sur seĝo kaj kunplektinte la kordojn rigardis konstante la kuŝejon de l' mortintino, de kiu varikolore brilis la lumaj radioj.

Lia animo estis hela kaj lia koro ĝoja.

Li trinkis kiel soifanto la unuajn radiojn de lumo sur la malhela vojo de vivo. —

Fino.

TAGO DE LA GLORO.

La traduko de: *Rudolfo Rajcei*.

— Mi ne faras al vi la komplezon, ke mi vin ridu.

— Vane vi min ridus. Mi scias, ke mi estas prava. Respondeco: tio ĉi estas la terura aĵo en la mondo. Mi neniam povis kompreni la inĝenierojn, kiuj per kalkulo elkalkulas siajn pontojn kaj ne retimiĝas de la penso, ke el tiu abstrakta kalkulo konstruiĝos efektiva ponto, sur kiu ŝarĝaj kaleŝoj iros sub kiu naĝos, kaj al kiu mil homvivoj estas konfidotaj. Mi petus la komitaton en ĉi tiu minuto ĝenuŝtante, ke ĝi min pafigu kapen, nur permesu al mi eksplozi sur tiu ponto. Mi ne fidus al tio, kion mi faras. Malsatinda estas, kiu elpensis tiun, aŭ almenaŭ tion, ke nia ago havas konsekvencon. Per ĉiuj miaj paŝoj mi dispremas mian sendependecon.

— Sed vidu: ĝis nun vi nenion faris, kio estus kaŭzinta al vi malbonon. Vi vin preskaŭ persekutas la feliĉon!

— Ĉu la feliĉo? Forportu la diablo la feliĉon. Mi eĉ eron da ĝojo en ĝi povas. Nur unu feliĉo ekzistas: nelabori, kaj unu ĝuo: dormi. Miaj feliĉoj estis ĉi tiuj, ke ili devigis min al novaj laboroj, kaj la zorgoj de novaj laboroj malĝis mian dormadon. Sed vane mi parolas, vi ne komprenas min.

— Ĉu vi scias, ke tio ĉi estas trosinŝato? Tiel eksterordinara individuo vi estas, ke oni vin ne povu kompreni. La ĵurnaloj ankaŭ — kiel vi vidas — komprenas vian pentraĵon kaj laŭdas ĝin. Apenaŭ ili havas mallaŭdan vorton.

— Al mi tio ne utilas, se ili min laŭdas. Ne ekzistas tiel troa laŭdo, el kia ĉi tiu povu sin enŝteli en mian memfidon. Kaj ne ekzistas tia mallaŭdo, se eĉ ĉi tiuj kaj sensenca, ke mi tuj ĝin ne kredu, kaj ne opiniu prava. Vane oni laŭdas vian pentraĵon: mi sentas, ke ĝi estas malbona. Miraklo estas, ke ĝi tiel sukcesis, ke mi sentas, ke mi neniam pentros. Sed se eĉ ĝi estus pli bona, mi ne povus ĝin pinii bona, ĉar mi ĝin faris kaj ĉar mi povis ĝin fari. Sed tamen doloras min, se oni min mallaŭdas. Kara ĝi estas por mi, kara estas ĝia tolo, ĝia oleo, ĝiaj koloroj, ĝiaj estis ĉiuj ĝiaj penikstrekoj. Ĝi estas kara por mi, kiel la malsana infano estas kara por la patrino, ĉar al ĉiuj ĝiaj tagoj alligiĝas la memoro de ia malĝojo mia, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo, poŝtiluziigo.

— Sed viaj enviantoj! Ĉu vi eĉ tial ne ĝojas, ke oni vin tiel envias?

— Ha, miaj enviantoj! Kiel mi povus tial ĝoji? Kiel malriĉa povas esti, kiu

envias miajn malriĉajn sukcesojn! Mi konas ilin. Ili estas sentalentaj malplenkreskuloj, kiuj pensas, ke mi staras antaŭ ilia vojo. Ili estas maljunaj azenoj, kiuj timas min pro sia pano, kaj mezaĝuloj, kiuj timas pro sia aŭtoritato. Eĉ nek unu ŝatinda homo estas inter ili, kiu meritis mian provokon, kun kiu estus glora la batalo.

— Ĉu viaj amikoj, parencoj, via amatino?

— Miaj amikoj . . . Miaj parencoj . . . Mia amatino . . . Tiun vesperon, kiam — kiel mi jam diris, — vi ne estis ĉi tie, mi devis sole hejmen faletiri. Apenaŭ mi elpaŝis el la kafejo: min trafis la malvarmo. Blovis glacimalvarma vento, kaj sub mia suprenfaldita kolumo ĝi glaciigis la neĝon. Mi tiris mian ĉapelon al la okuloj, ke ĝi tranĉis mian frunton kiel ringego. Mi loĝis en distanco de tridek paŝoj, nenie mi vidis kaleŝon, kaj kun spireganta brusto mi ekkuris por pli frue hejmenveni. Sed miaj genuoj tion ne povis, mi devis halti. Ĉirkaŭe je kvardek paŝoj mi estis sola, forlasita. Miaj dentoj kunfrapiĝis, kaj ankaŭ mia animo tremis, tiel mi sentis la malvarmon. Kaj en tiu minuto mi ekrememoris mian tiutagan gloron. Jen: en ia ĉambro de la ekspozicio pendas mia pentraĵo. Almenaŭ cent homoj memoras ĝian famon. Cent homoj kaj dek kritikistoj. Ĝi estas presita en dumil katalog-ekzempleroj, kaj sur ia breto, enpakita en papero, estas ĝia klisajo. Sur centmil ĵurnalpaperoj nigriĝas mia nomo, kaj ĝi estas enskribita en la anonca oficejo, en la matrikulo, en la militista etatlibro, en la impostlisto, en aro da ĉeflibroj, kaj en multaj paglistoj. Ekzistas multaj homoj, kiuj ŝuldas al mi, kaj alia multo, al kiuj mi ŝuldas. Estas iu, kiu nun songas pri mi, kaj ekzistas, kiuj vigle atendas mian hejmenvenon. Sendube miaj amikoj nun parolas pri mi kaj miaj enviantoj pro mi ne povas dormi. Mia bluzo pendas en la laborĉambro kaj mia malgranda revolvero kuŝas sur mia tablo. Tie estas ankaŭ komencita mia pentraĵo — ĝi neniam estos finita. Mia portreto estas en sekreta tirkesteto, sub miaj leteroj, apud fasko de miaj haroj, kion, en reva animstato iu detondis de mia verto. Hodiaŭ estas la tago de mia gloro kaj milionoj da fadenoj de interrilatoj min alligas al objektoj, aferoj kaj homoj — kaj la centro de tiuj ĉiuj milionoj da fadenoj, en la tago de sia gloro tie staras; — en noktomeza malvarmo, en la mondo de la nego, senprizorge, en forlasiteco kaj li frosttremas en la mezo de l' strato, kiel hundo elpelita

Fino.

NOKTO APUD LA LANDLIMO.

De Milutin Jovanović.

Ĉu vi scias, kion signifas la nokto sur altaĵo de unu el tiuj balkan'aj dek-livoj, kiuj per siaj randoj tuŝas la fluon de nia oreca Timok'-rivero? — Nokto de steloj en la senfina, blueta etero; nokto, kiam ĉio vekigis ĉirkaŭ ni kaj flustras sekretan kaj mallaŭtan murmureton; — nokto, de ĝemado kaj de kaŝita pasio en ŝvelintaj brustoj de vi'agaj junulinoj kaj junaj virinoj en la disjetitaj montaraj dometoj.

— Ho! niaj poetoj ne scias, kio estas la nokto, ĉar ili diras, ke ĝi estas mallaŭta kaj trankvila. Ili ne aŭdis ĝiajn mistikajn voĉojn en urba tumulto kaj en hele lumigitaj salonoj, — ili ne sentis tiun ebriigan spiron kaj malsekan odoron de l' herbo, kiun elspiras la nokto.

— Tiam, kiam el riveroj fluantaj komencas leviĝi maldiketaj kaj diafanaj tufoj de l' nebulo, kaj kiam en l' aero ekondiĝas la lasta ekĝemo de la tago kaj de ĝia tumulto, — tiam ekmarŝas ŝi majeste kiel imperiestrino, en kies nigra vualo brilas miliardoj da oraj steloj.

— Tiam, sub delikata kaj patrina nokta defendo ekparolas kaj revivigas ĉio, kio en surdiga tumulto kaj fluo de la tago ne povis ekaŭdigi sian mallaŭtan murmureton. Ekbruas oraj grajnaj spikoj sur fruktoportaj kampoj; la kanto de griloj kaj noktaj insektoj ekzumas en horo, kaj en antikva arbaro centjaraj fagoj kaj kverkoj komencas rakonti sian pratempan fabelon pri pasintaj tempoj kaj malaperintaj gentoj.

— Ruĝaj kapoj de papavo kaj tufaj floretoj de sovaĝa dianto, bruligitaj per varmegaj sunradioj dum la tago, malfermigas je malseka nokto, kaj tremas pro soifo kaj malforto, dume el la densiĝinta atmosfero enfluas en ilin per laĝ gutoj.

— Ĉie ĉirkaŭe flugadas fosforemaj skaraboj kaj zumado de iliaj maldikaj flugiloj faras dolĉan melodion, kiu rememorigas nin je tonoj de mandolinaj akordoj.

— De baraĵoj kaj sta'oj ofte ektramas sono de kupra sonorilo kaj ĝi disvastiĝas sone sur larĝaj regionoj kaj profundaj intermontaĵoj.

— Apud simplaj lignaj baraĵoj ĉirkaŭ fruktejoj kaj malpermesitaj arbaretoj ekbrilas per sia blankeco maldiketa ĉemizo sur sana korpo de vilaĝa junulino, kaj berdiĝas en la mallumo kaj ombro de maljunaj arbetoj. Poste de tie venas dolĉa murmurado. Tiu murmureto kaj tiu mallaŭta parolo de l' amo ebrigas kaj ravigas vin.

— Ho! kiel mi amas maltrankvilan, malsekan kaj parolantan nokton de mia maskiĝregiono!

Al fino *Zora Ratković* dediĉas tiun ĉi tradukon *Uroš Avdalović*.

SAĜA RESPONDO.

Popolrakonto el Bosnio-Hercegovino. Esperanten tradukis *Ĝuro Zvezdić*.

En la varmega Afriko renkontis iu homo belan, fieran leonon. Li ekrigardis ĝin fiere kaj la leono sin majeste deturnis, kaj nenion farinte al la homo ĝi volis foriri. Sed en tiu ĉi momento diris la homo: »Restu, majesta reĝo de l' bestoj kaj respondu al mi demandon«. La leono tuj ekstaris kaj scivoleme plilarĝigis siajn rondajn kaj grandegajn okulojn, kaj la homo ekparolis:

»Kial vi tiom fanfaronas kaj fieriĝas pro via kuraĝo? Oni diras, ke neniu estas pli forta kaj pli libera ol la leono, neniu pli kuraĝa kaj pli fortika kaj jen rigardu, mi havas hejme pentraĵon, kiu prezentas, kiel unu homo mortigis dek leonojn«.

Tiam la leono tiel respondis: Ho mia karulo, diru al mi, se ekzistus ankaŭ de nia raso pentristoj, ĉu vi opinias, ke ankaŭ ni ne povus pentri ke unu leono mortigis cent homojn!«

Tio estis profundsenca, saĝa respondo Post tio la homo eksilentis kaj murmurante nur ion tra la dentoj li daŭrigis sian vojon.

HUMORAĴOJ.

Fla tulo.

— »Mia amikino certigas, ke ŝi pli rapide povus naĝi ol mi. Ĉu vi kredas tion?«

— »Nature, fraŭlino. Viaj manoj kaj piedoj ankaŭ estas pli malgrandaj ol ŝiaj«.

Perfortakto.

— »Kiam mia edzino hieraŭ rifuzis doni al mi la pordŝlosilon, mi prenis ĝin al mi perforte!«

— »Sed kiel vi faris tion?«

— »Mi ŝtelis ĝin al ŝi el ŝia ŝurpoŝo!«

Mihael Mušič.

DRUŜTVENE VIJESTI.

Hrv. trg društvo »Merkur« stakilo nam je na raspolaganje svoje škole ke prostorije za održavanje naših tečajeva, na čemu izričemo pomenutome društvu najtopliju hvalu.

Prema tome otpočet ćemo ovih dana u prostorijama društva »Merkur«, Jelačićev trg br. 2. s novim tečajem, što ćemo u našim dnevnicima za vremena javiti.

SOCIETAJ SCIIGOJ.

La kroata komerca societo »Merkur« donis je nia dispono siajn lerneajn lokalojn por la tenado de niaj esp. kursoj. Ni esprimas pro tio al la dirita societo nian profundan dankon.

En kelke da tagoj ni komencos novan kurson en la lokaloj de la societo »Merkur«, placo Jelačić Nro 2.

Klub hrv. akademičara Esperantista u Zagrebu obdržavao je 9. travnja o. g. u Hotel Royalu svoju drugu glavnu skupštinu. Predsjedao je potpredsjednik kol. Stalzer, budući da je predsjednik kol. Badalić bio odsutan iz Zagreba.

Nakon toga, što su pojedini odbornici dali svoja izvješća, podao se starom odboru apsolutorij te se prešlo na biranje novoga. Novoizabrani odbor konstituirao se ovako: predsjednik: Ivan Stalzer, stud. iuris; potpredsjednik: Šime Matejčić, stud. iuris; tajnik: Ivo Krajcer, cand. iuris; blagajnik: Đuro Zvezdić, stud. iuris; knjižničar: Božidar Španić, stud. iuris; odbornici: Jaroslav Ružička, stud. iuris; Marko Ružić, stud. iuris; revizori: Josip Badalić, stud. phil., Rajko Šestan, stud. iuris.

Ova je glavna skupština snizila članarinu na 1 krunu semestralno.

Među eventualijama palo je više važnih prijedloga, među kojima ističemo, da se odlučilo zamoliti sveučilišnoga rektora za dozvolu, da se smiju obdržavati javni besplatni tečajevi na našem sveučilištu.

Kolega Stalzer preporučio je članovima, da se začlane u Universala Esperanta Asocio i Universala Studenta Unio.

Glavnu skupštinu pozdravio je brzojavno iz Beča dosadašnji predsjednik kol. Badalić.

Iza zaključenja skupštine bila je zabavna večer, kojoj su prisustvovali mnogi ovdješnji Esperantiste kao i nekoji gostovi.

Obavijest Prema objavi u posljednjem broju našega lista javljamo našim čitateljima, da je hrvatske kat. esperantiste na kongresu u Parizu zastupao stud. phil. Jos. Badalić, tajnik »Društva hrvatskih esperantista«.

Darovali su u tu svrhu: Preč. g. kanonik Baron 10 K, Eskomptna banka 20 K, preč. g. kanonik Horvat ml. 20 K, preč. g. kanonik Horvat st. 10 K, preč. g. kanonik Iveković 4 K, preč. kaptol zagrebački 200 K, Hrv. kat. banka 10 K, preč. g. kanonik Knežić 10 K, preč. g. kanonik Krapac 10 K, preč. g. kanonik Lang 30 K, preč. g. kanonik Leber 10 K, presvj. gđa grofica L. Pejačević 6 K, preuzv. g. nadbiskup Jos. J. Posilović 50 K, presvj. g. kanonik Pliverić 10 K, preč. g. kanonik Suk 10 K, Prva hrv. štedionica 30 K i g. ravn. kat. banke R. Šimunić 2 K.

Darovateljima, koji su svojim prinosima omogućili hrv. izaslaniku taj put, budi ovime izrečena najtoplija hvala. O kongresu samome donijet ćemo u budućem broju, jer nam to ovaj put ne dozvoljava prostor.

Kroata akademio Esperantista societo en Zagreb tenis la 9-an de Aprilo t. j. en hotelo Royal sian duan ĉefkunsidon. Prezidis la viceprezidanto kol. Stalzer, ĉar la prezidanto kol. Badalić forestis el Zagreb.

Kiam la komitatanoj estis raportintaj, oni donis apsolutorion al la komitato, kaj oni paŝis al elekto de nova komitato. La nove elektita komitato konstituigis jene: Prezidanto: Ivan Stalzer, stud. iuris; viceprezidanto: Šime Matejčić, stud. iuris; sekretario: Ivo Krajcer, cand. iuris; kasisto: Đuro Zvezdić, stud. iuris; bibliotekisto: Božidar Španić, stud. iuris; komitatanoj: Jaroslav Ružička, stud. iuris; revizoroj: Josip Badalić, stud. phil.; Rajko Šestan, stud. iuris.

Ĉi tiu ĉefkunsido plimalgrandigis la kotizaĵon al unu krono pro semestro.

Inter la eventualaĵoj estis kelkaj gravaj proponoj, inter kiuj ni citas, ke oni decidis peti de la univerzitata rektoro permeson teni publikajn senpagajn kursojn en nia univerzitato.

Kolego Stalzer rekomendis al la anoj, ke ili anĝu je Universala Esperanta Asocio kaj Universala Studenta Unio.

La ĉefkunsidon telegrafe salutis el Vieno la ĝisnuna prezidanto kol. Badalić.

Post la fermo de la kunsido estis amuza vespero, je kiu ĉeestis multaj ĉitiej Esperantistoj kaj kelkaj gastoj.

cand. iur. Ivo Krajcer,
sekretario de K. A. E. S.

RAZLIČITE VIJESTI.

DIVERSAJ SCIIGOJ.

»VERBAND DEUTSCHER ESPERANTISTEN«. Iz Leipzig a primismo objavu, da se 15. listopada 1907, ustrojio »Verband deutscher Esperantisten«

(Savez njemačkih esperantista» u svrhu proširenja i unapređivanja Esperanta. Ovaj savez, koji broji danas već nebrojeno članova iz čitave Njemačke pozivlje Esperantiste, da mu pristupe kao članovi. Članarina iznosi 50 feniga, koji se plaćaju jednom za uvijek. — Ne bi li se i mi hrvatski esperantisti ugledali u taj primjer i stvorili takav savez, kakovi postoje već i u drugim zemljama. — Uz malenu članarinu mogli bi članovi toga saveza mnogo doprinijeti širenju našega pokreta i tako koristiti miloj nam domovini.

D. B.

IZ BEOGRADA. 22. III. 1910. otvorio je g. Siniša Budjevac tečaj konverzaciju, a gosp. inžinir Drag M. Andonović sveučilišni docent i predavač časnik S. E. S. tečaj za početnike — oba tečaja na sveučilištu. Osim ova dva tečaja postoje još tri: jedan privatni, kojega vodi g. I Nenadović, jedan za socialiste (radnike) i jedan za trg mladež. Osim toga otvoren je tečaj u Privatnoj trg. akademiji, i jedan u trg. akademiji. — Kako smo već javili, bit će po svojoj prilici ove godine esperantistički kongres u Beogradu, pak ćemo o tome donijeti nešto točnije obavijesti — Nadamo se, da će što više hrvatskih esperantista prisustvovati tome kongresu.

J. Nenadović.

ESPERANTISTIČKA SVEČANOST U SORBONNI U PARIZU. Naše uredništvo primilo ulaznicu za svečano razdjeljivanje nagrada esperantskoga književnoga natjecanja, koja će biti u prostorijama sveučilišta Sorbonne, Amphitheatre Richelieu u nedjelju 20. travnja u 2 i 1/2 s. po podne pod predsjedanjem podadmirala M. le Bayle i odbora »Groupe Esperantiste de Paris«. Za svečanosti svirat će vojn. glazba 5. puk. inf.

† IVAN BERLEKOVIĆ La 14an de Aprilo mortis en Novi (Kroatujo) 63 jara general-intendant, Ivan Berleković kavaliro de l' ordeno de Francisko-Josefo I, posedanto de la jubilea medalo kaj kruco k. t. p. post malongedaŭra malsano kaj estis tie enterigita. La mortinto, kiu estis en Kroatujo generale konata kaj ŝatata persono, estis apoga membro de nia esperantista societo »Društvo hrvatskih esperantista«. Lia morto faris malĝojan, doloran efikon en liaj multnombraj amikoj kaj konatuloj! Ripozu dolĉe!

BIBLIOGRAFIO.

LA **RETA ZA ĈIUNN** **MEZDAŬARADENN** **ĈIZEN** estas la nomo de noveaperinta verko de Iv. H. Krestanof, kiu verko estas la 2 Nro de la Bulgara-Esperanto Biblioteko, pri kiu ni jam skribis en la 2a Nro de K. E.

DICTIONAIRE ESPERANTO-FRANCAIS avec nombreux dérivés et locutions usuelles (Esperanto-franca vortaro' de Em. Robert, Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo: broŝ. 2 fr.; bind. 3 fr. Tre ŝatinda verko. utila eĉ necesa al ĉiu franclingva lernanto de Esperanto. Bedaŭrinde la manko da spaco ne permesas al ni priparoli pli precize tiun bonegan verkon.

POPOLNA SLOVNICA ESPERANSKEGA JEZIKA, priredil Ljudevit Gosser. Prezo 1 K. Tiu ĉi bona verko farita laŭ la bonega franca-esperanta gramatiko de Th. Cart estas ĝojiga apero en la arto de esperantaj instruaj verkoj, kaj ni ĝin varmege rekomendas al ĉiu Esperanton lernonta Sloveno.

RAPORTO PRI LA KVINA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ, Barcelona de 1909. eltirita el »Lingvo internacia«, Dro P. Corret, Paris, Presa Esperantista societo 33, rue Lacépède. Prezo 75 centimoj

PRI LA INDO EUROPAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO de Th. Cart, Paris, 1910. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo 15 centimoj (0.06 Sm.) Ni permesos al ni en unu el la venontaj Nroj de K. E doni al niaj legantoj la kroatian tradukon de la finiga ĉapitro de tiu interesa, science pritraktita verketo.

LA VAKCINIUJA KRONO. Novelo de J. Poruks, tradukita el latva lingvo Kikan. Paris 1909. Prezo: 50 c. (0.20 Sm.) Presa Esperantista Societo, 33, rue

Lacépède. Tiu ĉi interesa pliriĉigo de esperanta novelaro ni rekomendas al nia legantaro. **ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA** de J. Borel, No 9. Praktika Frazaro dialogoj de la ĉiutaga vivo la A. Matthias. Berlin, Esperanto Verlag Möller & Borel. Prezo 0.10 Sm. Bona ekzercaĵo por ĉiu Esperanto-lernanto, kiu volas perfektigi sin en nia kara lingvo.

KONATAJ MEDICINAJ PRODUKTOJ, fabrikitaj de Burrougs & Co., Dartferd apud London. Priskribaĵo kaj prezaro de la fabrikaĵoj de l' nomita firmo, kiu dissendas tiun esperantan liston senpage.

ĜENERALA KATALOGO de la verkoj eldonitaj de »Presa esperantista societo 33, rue Lacépède, Paris

NOTICE SUR L' INITIATEUR MATHÉMATIQUE, de Jaques Camescasse. Ien de petits cubes rendant facile dans da famille et a l' ecole la mise en pratique de »Initiation mathématique« de C. — A. A. Laisant. — Librairie Hachette & Cie, 79, Bd. Sains-Germain, a Paris.

ĈEKBANKO ESPERANTISTA, Merton Abbey, London S. W. Enhavo: La celo kaj utilo de la Ĉekbanko. Regularo. La valoro de la ĉefaj naciaj monunuoj en francaj frankoj. Ĉiu esperantisto, kiu deziras pli detale sciigi pri la agado de tiu ĉi utila esperantista entrepreno, mendu la supre cititan libreton.

KLIENTARO DE LA ĈEKBANKO ESPERANTISTA. Merton Abbey, London, S. W. dua Nomaro 1. I. 1910.

Novaj muzikajoj.

KORAJ SONOJ. (Mazurko por Piano Solo) de G. A t a n a s o v Aĉetebla ĉe: Muzikeldonisto A. B e s n a r d, 26, rue Antoinette, Paris Prezo 1.75. Per tiu ĉi bela muzikaĵo plimultiĝis la »katalogo de Esperantaj kantoj« de Sro Bessnard, profesoro, mandolinisto ĉe l' Opéra kaj l' Opéra - Comique en Paris. La katalogo estas ricevebla ĉe la supre citita adreso.

Novaj gazetoj.

ESPERANTO ET CROIX - ROUGE, bulletin de la »Société Française Esperanto — Croix-Rouge. Paris, Librairie Hachette & Co, 79. Bd St. Germain. La prezo de tiu ĉi nova gazeto, kiun ni rekomendas precipe al niaj militistanoj estas 1 fr. jare.

GAZETO ANDALUZIA, monata revuo, organo de la grupoj de Cadiz kaj ĝia regiono. Cadiz, Hispanujo. Jara abono Sm. 1.40.

NEDERLANDA KATOLIKO. Red. I. N. J. Smulders, Arts te Schijudel, adm. Joh Lüneman, od. Nerrst. 40, s. Hage (Nederland) Jara abono por la eksterlando 0.70 Sm. Plene rekomendinda, bonega revuo.

ILLUSTRAZIONE MILITARE ITALIANA, ĉiu 103, Via Tomacelli, Roma, Italujo. Jara abono eksterlande 20 fr. (8 Sm). Bona, eleganta gazeto kun esperanta aldono.

IL BIBLIOFILO MILITARE, via Cavour 101. Roma. Jara abono Sroj 25. Bonega gazeto, enhavanta 4 paĝan aldonon esperantan. Direktoro de esperanta fako Mons. Liugi prof. Giambene.

Ni rekomendas la suprediritajn gazetojn al ĉiu esperantisto, ĉu militisto ĉu ne, kiu volas helpi la ĝeneralan propagandon esperantan.

Ĉiujn nove aperintajn gazetojn ni salutas tre kore kaj deziras al ili bonegan prosperadon! *Kroata Esperantisto.*

La Esperanta Stenografio (sistemo Roller) gajnas ĉiam multenombrajn anojn pro sia facileco kaj praktikeco kaj espereble baldaŭ fondiĝos kelkaj grupoj de Rolleranoj. Kiel konate dissendas Sro Heinrich Roller en Berlin Nro 39, Fennstr. 44 lernlibron de sia sistemo por — 50 Sm. kaj petas sendi al li adresojn de la anoj de sia sistemo el ĉiu terpartoj

mana Esperantisto, Bukarest, 5.		tistoj. Praha. Red. K. Kuthan, Ječná 24.	
ir. I. C. Bratiann, Red. Dro. G. Robin	2-—	Adm. F. Stepanek, Karsin 241.	
mana Gazeto Esperantista, of. org.		The Australian Esperantist , Independ-	
e IFederacio de la Esperantistaj So-		dent, Office, Benalla, in the State of	
etaj el Rumanujo, Bukaresto, Str.		Victoria, Austrajia.	
ollej 16. Dir. Dro. S. Kimmel.		The British Esperantist , High Holborn,	
ad am die Wolf, Wolfenbüttel, Heck-		London, W. C.	1-50
ers Verlag. Red. Prof. Dr. Siegfried		Tra La Filatelio , Béziers, Francujo	
ederer, Prag-Weinberge, Nerudagasse 4.		2, rue Abélard, Red. F. Florens	0-80
landa Esperantisto, Peterburgo,		Tutmonda Espero , Barcelona, Paradis 12	2-—
evskij, 40 Red. Sro. Espero	3-20	Verda Stelo Internacia , Miller, Mi-	
ideano Cimnata, Redak.: Verda		surio, U. S. A.	
ello & Ko. 33. Abekawa-machi Asa-		Universo , Wolfenbüttel, Heckners Verlag	
usa, Tokio Japanujo.		(Germanujo). Red. Dro. Albert Schramm	3-—
ta Stelo, Le Mance Sarthe (Franc-		Voĉo de Kuracistoj , Lwów (Aŭstrio-	
o), 14, rue Scarron, Red. Lepeltier	0-40	Galicio), Strato Śniadeckich Nro. 6	
ento, revuo de studentoj esperan-		Red. Dro. Stefan Mikolajski	1-50

MIDEANO Internacia Ilustrita Esperanta Revuo por literaturo, scienco, be-
MONATA larto kaj familia legilo de multaj orientuloj kaj okcidentuloj. —
 Kun aldono de originala pentraĵo (25 × 37 cm) en 30 koloroj
 pli sur japana originala papero. — **Jara abono 2 75 Sm (5.65 M.)**, i numero
3d. Verda Stelo et ko (Sro M. Hikosaka) 33 Abekawa-Machi Asakusa.
 Japanujo.

ius aperis la dua parto de la plena vortaro **Esperanto-Esperanta**
 Esperanto-Franca de Rektoro **Boirac**, entenanta la literojn L kaj sekvantajn
 Z. — Oni povas de nun mendigi de la Presejo **Darantierre**, Dijon, Cote
 or, Francujo, kaj de ĉiu esperantista librovendejo en ĉiu lando.
 Prezo de la dua parto: **4 fr. 50** (afrankite).
 Prezo de la plena vortaro **9 fr.** (afrankite).
 Ĉiu aĉetinto de la plena vortaro havos la rajton ricevi **senpage** apartan
 aron, baldaŭ aperontan en kiu troviĝos, kune kun listo de korektoj (pre-
 roj, ne sufiĉe ĝustaj aŭ precizaj difinoj, ktp.) Aldono enhavanta ĉiujn novajn
 radikojn ĉerpitajn el la plej freŝdataj vortaroj, eĉ aperintaj dum la presado
 la plena vortaro, nome Esperanto-Rusa de Dro **Zamenhof**, Esperanton-
 ca de **Robert**, Polo-Esperanta de **A. Grabowski**, Italio-Esperanta de
azzini, ktp. Petas komuniki al la publiko **E. Boirac**.

Gramatika Esperanta napisala **Danica Bedeković - Pobjenička**. —
 Potpuna slovnica s jasnom i lako shvatljivom
 tom u Esperanto uz mnoge primjere, vježbe i esperantsko ŝtivo u pjesmi i
 — Cijena broširanoj **K 3**—, ukusno vezanoj **K 4-50**.

per. - hrvatski rječnik od **Danice Bedeković Pobjeničke**. — Naj-
 potpuniji od sviiju dosadašnjih esperantskih
 nika. — Cijena **K 4**—, ukusno uvezanome **K 5**—.
 radene knjige dobivaju se u knjižari i „esperanto nakladi“ **JOSIP SOKOL**,
 Zagreb, Marovska ulica 21.

esperantski znakovi (zelena zvijezda) za gospode (igle) i gospodu
 (puceta) dobivaju se u našem uredništvu komad
po 50 filira.

lijepo
 atske **Razglednice sa slikom Dra. Zamenhofs** izdanje
 tskih Esperantista mogu se naručiti u našem uredništvu. Komad po 10 fil.
 Društva

NOBILIOR

medicinalna drugerija i parfumerija

ZAGRER, Hlica 33

Drogo, kemikalije, medicinske i kosmetike specialitete kirurške i povojne robe. Zivinarske specialitete i fotografske potrebštine. Na malo i veliko.

VIZAĜMASAĜO.

laŭ sveda metodo per la mirinde efikanta Nobilior-kremo, kiu uzadata laŭ la aldona uzadmetodo, junigas, glatigas, konservas, plibeligas ankaŭ la plej malbelan vizaĝhaŭton. Sole etika preparaĵo por fariĝi efektive bela kaj por konservi la belecon. 1 vazeto K 1-50. Nobilior sapo, igas lavadon plezura, ĉar ĝi estas la unika sapo, kiu faras vizaĝhaŭton tre belan, delikatan kaj glatan. 1 peco K 1.— Nobilior-pudro uzata post la masaĝo faras vizaĝon juneca, kaj malhelpas la ŝvitadon, estas garantie nedifektanta kaj nerimarkebla. La brilado kaj krevigado de la haŭto estas nebla, 1 skat. en ĉiuj koloroj K 1-50. Akva Florida kiel toaletakvo, 3 gutoj en la lavadakvon donas eternan junecon. 1 bot. K 2.— kaj K 5.— La bella Bieta, rugigilo por vangoj kaj lipoj, la sole ekzistanta rugigilo, kiu nerimarkeble rozkolorigas kaj ne estas facile forviŝebla. K 1.— La supre cititaj artikolaĵoj liveras - se oni sciigos precizan adreson - la Nobilior drogejo kaj parfamejo en Zagreb Hlica 33.

! Similaj artikolaĵoj ne ekzistas!

Por la printempa kaj somera sezono!

Ni rekomendas al la p. t. publiko nian riĉan tenejon de plej novaj kaj plej modernaj stofoj kaj silkoj por kostumoj, vestoj, bluzoj k. t. p.

Niaj prezoj estas malaltaj kaj fiksitaj kaj la provizaĵo tre abunda.

Modeloj afrankite. Solida servado.

DE S. BERGER SEKVANTOJ.

Zagreb.

Za proljetnu i ljetnu sezonu!

Preporuĉamo p. n. opcinstvu naŝu opŝeĝnu radnju za nabavu najnovijih i najmodernijih ŝtofova i svile za kostume, oprave i bluze i t. d.

Naŝe su cijene niske i stalne, a izbor je velik.

Uzorci franko. Solidna podvorba.

S. BERGER-A NASLJEDNICI,

Zagreb, Jelačićev trg br. 2.

trgovina pomodne, manufakturne i platnene robe.

Meblofabrikejo kaj ateliero por dekoracioj

BOTHE I EHRMANN

LIVERANTOJ DE LA IMP. kaj REĜA KORTEGO

Zagreb Deponejo kaj ateliero Hlica 38
fabrikejo Hlica 45

Wien deponejo kaj ateliero Carlsplatz 2
fabrikejo V. Schlossgasse 10

Vaporforta meblofabrikejo.

Propraj produktaĵoj

solidaj

MEBLOJ

por simpla loĝejaranĝo, plena edziga doto kaj «viloj», por kafejoj, restoracioj kaj oficejoj, kiel ankaŭ tapiŝigo de ĉiuspecaj lokaloj, lamberi-ellaborado de teraj kaj mesingaj mebloj, kurtenoj, matracoj, tapiŝoj, linoleumo, speguloj, bildoj, infanveturiloj k. t. p.

Ilustritaj katalogoj, fotografaĵoj kaj precipe ellaboritaj planoj kaj kalkuladoj estas je deziro afrankite kaj senpage sendataj.

Pagadfaciliĝoj sen pligrandigo de prezoj.